

## Rekordoj kaj metodoj

### ĉe la Esperanto-Lernejo ĉe Eventoj en Budapeŝto

La Esperanto-Lernejo ĉe Eventoj/Lingvo-Studio en Budapeŝto estas verŝajne la plej granda Esperanto-Lernejo (aŭ unu el ili), kaj dum ĝia funkciado ĝi atingis plurajn elstarajn sukcesojn, eĉ rekordojn (*pagata interreta kurso, plurmil studentoj, verŝajne la plej ampleksa studmaterialo, ktp*). En la nuna prelego mi volas rakonti pri tiu agado, pri la uzataj metodoj kaj la atingitaj rezultoj, rekordoj.

En Hungario Esperanto havas unikan statuson: ĝi estas rekonata kiel normala, ordinara fremda lingvo. Oni rajtas ĝin instrui en ĉiuj tipoj de eduk-instancoj (*infanĝardenoj, lernejoj, universitatoj, ktp*), en ŝtataj kadroj oni formadis Esperanto-instruistojn, oni povas havi abituriantan ekzamenon pri ĝi, kaj ekde la jaro 2000 oni povas elekti ankaŭ Esperanton por sia deviga lingvo-ekzameno, preskribita kiel deviga kondiĉo por ricevi diplomojn en la universitatoj.

Ekde la jaro 2000 en ĉiu jaro pluraj miloj de studentoj lernis Esperanton por havi ekzamenon pri ĝi. Ĉe la Esperanto-Centro Eventoj en Budapeŝto ni funkciigas apartan lingvo-lernejon, kiu zorgas pri kompleksa instruado de Esperanto, kaj preparo de la kursanoj kutime al la meznivela ŝtata ekzameno B2.

Mi bedaŭras, ke malgraŭ pluraj invitoj la redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo de ILEI trovis la 10-jaran funkciadon de la Esperanto-Lernejo ne sufiĉe interesa kaj inda por prezentado en IPR, do mi uzas la okazon ĉi tie prezenti nian agadon – la unuan fojon en internacia forumo.

### Mallonga resumo pri la nomo: "Eventoj"

En la komenco mi klarigu iom mallonge pri la uzata nomo "Eventoj". Eble kelkaj pli malnovaj aktivuloj memoras, ke dum 10 jaroj, inter 1992 kaj 2002 ni redaktis kaj eldonadis paperan Esperantan gazeton kun la titolo "Eventoj". La gazeto aperis du-semajne, do tiam ĝi estis granda sensacio, ĝi ja estis la "plej ofta Esperanto-gazeto". Eventoj estis sendependa, ne ligiĝis al iu landa aŭ internacia Esperanto-Asocio, estis populara, kaj havis milon de abonantoj en ĉ. 60 landoj! Tio okazis ankoraŭ antaŭ la interreta epoko, do realigo de la 2-semajna aperritmo tra 10 jaroj estis nesimpla laboro... La eldonadon de la papera gazeto ni haltigis en 2002, sed nian budapeŝtan Esperanto-Centron internacie oni daŭre nomas "Eventoj" :-)

**Eventoj**  
LINGVO-Studio, Budapest

Ne estas vaste konate, sed la gazeto Eventoj atingis kelkajn rekordojn:

- plej ofta E-gazeto,
  - unua propra domajno inter E-gazetoj,
  - la sola E-gazeto, havanta regionajn represitajn versiojn,
  - unua elektronika versio de E-gazeto (*retpoŝte, txt, interredaktore*)
  - unua publika arkivo
- Per sia 2-semajna aperritmo dum la tiamaj 10 jaroj ĝi vere estis "**la plej ofta**" Esperanto-periodaĵo. Se paroli sincere, en la historio de E-o ekzistis eĉ pli oftaj gazetoj, (*ekz. Semajna Bulteno redaktita de Eckhard Bick, aŭ la ĉiutagaj numeroj dum la Universalaj Kongresoj, ktp*), sed Semajna Bulteno travivis nur kelkajn numerojn, kaj la kongresaj kurieroj estas nur portempaj eldonaĵoj.
- Eventoj estis la **unua** Esperanto-gazeto, kiu registris **propran domajnon** por si! La domajno eventoj.hu estis aprobita en decembro 2000. Oni devas ne forgesi, ke tiam ni vivis nur en la komenco de la interreta epoko, kaj tiam ankoraŭ tute ne estis kutimo registri proprajn domajnojn... :-)

- Laŭ mia scio Eventoj estas la **sola** Esperanta gazeto, kiu havis **lokajn represitajn versiojn**. Post la fino de la redaktado de la unuopaj numeroj la laserprintitajn originalajn ekzemplerojn ni sendis per rapida/aera poŝto al niaj kontraktaj partneroj en Polio, Litovio kaj Rusio, kie oni multobligis ilin (*preseje aŭ fotokopie*), en la koverto aldonis sian enlandan, nacilingvan E-bultenon kaj dissendis ilin al tieaj abonantoj per enlanda poŝta tarifo. Estis bona ideo, kiu ebligis signife malaltigi la abonkotizon de Eventoj en pluraj landoj, kio rezultis signifan kreskon de tieaj legantoj/abonantoj. - Tiuj regionaj represoj ne estis sekreto, tamen ni ne multe fanfaronis pri ili tiutempe, ja ankaŭ tiam ni havis jam plurajn enviulojn...
- Eventoj estis la **unua gazeto**, kiu aperis ankaŭ **en elektronika formato!** - Kiel rezulto de du novaj teknologioj (*komputila kompostado kaj interreto*) ekde aŭgusto 1996 ni lanĉis la kunlaboran forumon "Interredaktore" por ĉ. 90 redaktoroj de Esperanto-gazetoj kaj bultenoj. Enkadre de tiu inform-interŝanĝo ni dissendadis al ili ankaŭ la elektronikan version de la aktualaj numeroj de Eventoj. Post unu kaj duonjara sperto ekde januaro de 1998 ekfunkciis la retpoŝta novaĵservo Ret-Info, komence kun aludo al la gazeto sub la nomo: Ret-Ventoj. La tiam ankoraŭ paga servo inkluzivis ankaŭ la elektronikan (*t.e. tekstan/retpoŝtan*) formaton de Eventoj.
- Eventoj estis la **unua Esperanto-gazeto**, kiu almetis sian **plenan arkivon** al interreto, kaj ebligis ĝian senpagan elŝutadon! - En la papergazeta epoko la sendokostoj forte limigis la distribuajn eblojn, do eĉ malnovaj numeroj de gazetoj havis finanĉan valoron. Tuj post ĉeso de la papera eldonado, en la komenco de la jaro 2003 ĉe Eventoj ni transformis la dumredaktan formaton (Ventura 4.11) al simple legebla teksta formato, kaj alŝutis ĉion al la retejo por senpaga alireblo. Kiel interesaĵo mi aldonu, ke ĉ. 20 unuajn numerojn de Eventoj ni devis manuale retajpi, ĉar en la komenca tempo ni ne gardis la elektronikan version pro la tiama alta kosto de durdiska spaco... :-( La arkivo de ĉiuj numeroj - kun interna serĉilo - estas trovebla ĉe <http://www.eventoj.hu/arkivo/>

## Esperanto-lernejo "Lingvo-Studio" en Budapeŝto

Post la fino de la gazeta erao nia teamo en la Budapeŝta Esperanto-Centro turnis sian atenton al demandoj kaj problemoj de la amasa instruado de Esperanto en Hungario. Ni elformis lingvolernejon, en kiu ĝis hodiaŭ lernis klasĉambre aŭ interrete pluraj miloj (!) de studentoj por akiri mezgradan ŝtatan ekzamenon.

La lingvolernejo fakte estas komuna projekto de mia firmao Lingvo-Studio funkcia ekde 1984, de la Fondaĵo Esperanto en Hungario, kaj de E-Societo Eventoj. En la praktiko ĝi funkcias tiel, ke la lingvoinstruajn taskojn praktike plenumas nia firmao Lingvo-Studio, sed per parto de la enspezo ĝi subvencias la Fondaĵon kaj la Societon.



La Esperanto-Lernejo povas fieri pri kelkaj sukcesoj:

- la sola pagata interreta kurso de Esperanto eĉ internacie;
- stablo de konstanta, profesia Esperanto-Lernejo en 110 m<sup>2</sup> areo, kun 3 lernoĉambroj;
- ellaboro la plej ampleksa instrumaterialo (laŭ mia scio);
- unua uzado de krucenigmoj laŭ lernolibra sistemo;
- verŝajne rekordo pri kvanto de lernantoj (en relativa nacia nivelo);

## Plej granda fizika Esperanto-lernejo

Post plurjara funkciado (kaj pagado de luo-kotizoj de lernoĉambroj en diversaj instancoj) en la jaro 2006 fine ni aĉetis propran infrastrukturon (loĝejon kun posta transformata rekonstruado), proksime al la urbocentro, tuj apud la metroa stacio „Klinikák” en Budapeŝto.

La tuta ejo estas uzata ekskluzive por Esperantaj celoj, ĉefe por instruado de la lingvo, en libera tempo por kunvenoj kaj renkontiĝoj.

## Rapidaj resumo kun ciferoj

- la areo de la lernejo estas 110 kvadratmetroj, kun ĉiuj teknikaj ekipaĵoj;
- la lernejo havas 3 lernoĉambrojn, kun po 14 seĝa meblaro;
- ĉiu lernoĉambro estas ekipita per videaj kaj sondiskaj aparatoj, televidiloj;
- en la lernejo ni laborigas 5-8 instruistojn – laŭ apartaj unuopaj kontraktoj;
- en la lernejo studas ĉiujare 180-250 kursanoj;
- la kursoj estas unuŝtupaj, kio signifas ke ili gvidas la lernanton de la nula nivelo ĝis la mezgrada ekzameno (B2)

Retpaĝa adreso de la Lernejo estas: <http://www.esperanto-tanfolyam.hu> → Esperantan version oni trovas laŭ la verda flago en la supra, dekstra angulo.



Mallonga 2,5 minuta filmeto pri la Esperanto-Lernejo ĉe Eventoj / Lingvo-Studio kun enŝaltebla Esperanta subteksto estas videbla ĉe: [http://www.youtube.com/watch?v=ab\\_4ojVTgv8](http://www.youtube.com/watch?v=ab_4ojVTgv8)

## Unua / sola (?) pagata interreta Esperanto-kurso


Ne estas vaste konate, ke apud „Lernu” ekzistas alia, profesia interreta kurso – por hungaroj. Ili diferencas ĉefe en 2 terenoj: nia kurso estas pagenda, kaj ĝi preparas la lernanton rekte al la postuloj de la mezgrada lingvoekzameno B-2. (*Temas pri la sama ekzameno konata kiel „Internaciaj Ekzamenoj de UEA” – ja ĝin organizas la sama hungaria instanco ITK-Origó.*)

- Ni ellaboris ĝin en 2002-2003 plene paralele, kaj tute sendepende de Lernu.
- Kvanto de kursanoj varias de monato al monato, sed en decembro 2012 ni festos la aliĝon de nia 4000-a reta studento...
- Ĉe ni ekzistas nur unu kurso, sed ĝi baziĝas sur propraj pedagogiaj principoj (*kun malpli da ornamaĵoj, sed kun pli da pedagogiaj elementoj*) – kio rezultigas pli da sukceso, pli da kursfinintoj.
- La kurso gvidas de nulo ĝis la meza ekzameno B-2, kun 12 lecionoj, kun kompleksa sistemo.
- Ĉiu leciono inkluzivas hejmtaskon, kiun korektas viva profesia instruisto, kaj resendas ĝin al la kursano.

- La kursokotizo inkluzivas 2-foje senpagan personan konsult-eblon kun viva instruisto en nia Esperanto-Centro.
- La kurso inkluzivas devigan lernadon ankaŭ de movadaj konoj. Tiuj movadaj informoj estas integritaj en la kurso-sistemon, kaj oni ne povas plui al la sekva leciono sen ilia ellernado :-)
- Malgraŭ la paralela konkurenco de la hungara versio de la senpaga kurso Lernu – studentoj tamen venas al ni kaj pagas signifan sumon por uzi nian version. Tiun ĉi fenomenon ni taksas granda sukceso de nia profesia merkataka kaj manaĝa laboro...

## Unikaĵoj:

- ◆ **Krucenigmoj** laŭ lernolibra sistemo! - Por helpi la ludan vortolernadon ni (*laŭ mia scio*) unue en Esperantujo ellaboris krucenigmojn por ĉiu leciono kun speciale adaptita vortprovizo! Tio signifas, ke la krucenigmoj uzas NUR tiujn vortojn, kiujn la lernanto laŭ la lecionoj jam devas scii! Ni ellaboris eĉ du versiojn por ĉiu leciono: la pli simpla versio enhavas nur vortojn de la koncerna leciono, la pli malfacila uzas (teorie jam konatajn) vortojn ankaŭ de la antaŭaj lecionoj. La retkursaj versioj estas interaktive solveblaj en la reteja kurso, por lernoĉambraj kursoj estas produktitaj paperaj kaj pdf-versioj. Por konatiĝi esperantigita provversio estas videbla ĉe <http://www.eszperanto.hu/tanfolyam/krucenigmo-sikeresen-6-leciono-20-eo.htm>



- ◆ **Popmuziko** dum la kurso! – Fama hungara pop-kantistino Koncz Zsuzsa kantis iam unu kanton en Esperanto. Kaj la kantistino kaj la kanto estas vaste konata por hungaroj. La Esperantan sonregistraĵon ni preparis kiel karaoke-materialo, kaj uzas ĝin dum la kursoj kaj por ekzerci la tradukadon, kaj por igi la Esperantan kulturon – ĝian unuan ŝtupon – simpatia por la kursanoj.
- ◆ Unikaĵo en Esperantujo kaj ankaŭ en Hungario: komence ni havis la retan kurson, laŭ la funkciadaj spertoj dum 1,5 jaroj ni korektis kaj plibonigis ĝian enhavon, kaj surbaze de tiu materialo poste ni kompostis la lernolibron. Mi ne scias pri alia lernolibro, kiu estus farita per simila metodo: komence interaktiva reta kurso, kaj poste lernolibro el la sama materialo.

## Ĉu la plej kompleksa lernomaterialo?

Mi okupiĝas pri instruado de Esperanto de ĉ. 30 jaroj kaj kiel instruisto, kaj kiel organizanto. Surbaze de la ĝisnunaj spertoj mi havas la impreson, ke en nia lernejo ni sukcesis elformi la plej kompleksan pakaĵon de instru-materialoj, ĝis nun renkontitaj:

- ◆ lernolibro – kun principo de zagreba metodo, formato B-5, 242 paĝoj
- ◆ sonmaterialo – ne nur sonlegaĵoj de la lecionoj, ankaŭ kromaj sonmaterialoj. Bona sonkvalito, 59 minutoj, (ekzistas kaj KD- kaj kaseda versioj)
- ◆ laborkajero – taskofolioj por ekzercado, 80 paĝoj, B-5
- ◆ hejmatasko-folioj – antaŭpreparitaj por ĉiu leciono de la lernolibro, A-4, duflanka
- ◆ senpage elŝutebla komputila ekzerca programo – por ekzerci la unuaj du lecionojn
- ◆ paga interreta kurso – kun multcent interaktivaj ekzercoj
- ◆ krucenigmoj kun speciale adaptita vortprovizo – du versioj por ĉiu leciono
- ◆ Esperanta popmuziko / karaokeo

- ♦ postlernolibre: István Nemere verkis speciale por nia lernejo tri novelojn, kiel unuaj legaĵoj post la lernolibro
- ♦ integritaj movadaj konoj + socia ludo pri Pasporta Servo
- ♦ kursofine laŭtema vortarprogramo kun 25 temoj – apartaj niveloj A2 / B2 / C1
- ♦ kromaj helpiloj por instruistoj
  - resuma tabelo pri lingvaj elementoj po lecionoj – por superrigardi, kiujn gramatikajn elementojn oni jam instruis ĉe la koncerna leciono
- ♦ Helpiloj por instruistoj por konstrui proprajn ekzercojn kaj taskojn:
  - resumaj vortolistoj po lecionoj - laŭ alfabeto – la konataj radikoj kaj vortoj ĝis la koncerna leciono
  - resumaj vortolistoj po lecionoj - laŭ vortospecoj \* (la konataj verboj / substantivoj / adjektivoj / ceteraj vortoj ĝis la koncerna leciono)

**Nyelgyakorló program az eszperanto tanulásához - demo verzió - 2**

**Feladatlap kiválasztása:**

**1. lecke**

- 1. lecke - 1. gyakorlat, végződések, 54 kérdés
- 1. lecke - 2. gyakorlat, végződések, 14 kérdés
- 1. lecke - 3. gyakorlat, nyelvtani elemek, 34 kérdés
- 1. lecke - Szavak kikérdezése - 56 kérdés
- 1. lecke - Tudáspróba, ellenőrző teszt - 15 kérdés

**2. lecke**

- 2. lecke - 1. gyakorlat, nyelvi elemek, 18 kérdés

**www.eszperanto.hu**

Kilépés

A programról    Hogyan tovább?    Az eszperantóról

## Ĉu vere la plej granda E-Lernejo?

Por taksu la relativan grandecon de la lingvolernejo Eventoj / Lingvo-Studio ni konsideru, ke Hungario havas 10 milionojn da loĝantoj.

Do nia kvanto de ĉ. 180-250 lernantoj en lernoĉambraj kursoj en unu jaro signifas 1 kursanon po 40-55 mil hungariaj loĝantoj. Por havi komparon kun danko mi estus ricevinta statistikaĵojn de alilandaj E-lernejoj.

## De kie venas la studentoj?

Pri instruado de Esperanto en Hungario okupiĝas/-is ĉ. 200 personoj, pluraj lingvolernejoj kaj Esperanto-Asocioj, kio signifas konsiderindan konkurencon unu por la alia...

Por varbi studentojn ĉe Eventoj ni elspedas multajn centmilojn da forintoj por reklamado. Ni pagis kadritajn anoncojn en selektitaj gazetoj, ni funkciigas reton de retpaĝoj kun ĉ. 10 propraj

domajnoj, ni faris anoncojn en radiostacioj, en iu jaro eĉ en televido, ni zorgas pri intervjuoj en amasmediaj kanaloj, ni financas plurajn kampanjojn ĉe Google-Adwords, por kiu ni elspezas ĉiujare ĉ. 1,5-2 monatan averaĝan hungaran salajron...

Ni iom fieras pri rezultoj ĉe Google-serĉado. Se en Hungario iu serĉas laŭ la vorto "eszperantó", en la unua paĝo 7 trafoj el 10 montras al niaj retejoj... :-)

Tamen la prezento kaj analizo de varbaj kaj reklamaj metodoj jam estus temo por alia prelego...

---

En la fino mi volas mencii, ke la funkciigon de la Esperanto-Lernejo, la instruadon de plurmil lernantoj, la kreadon de la interreta kurso, la ellaboradon de studmaterialoj ne subvenciis eksteraj instancoj, nek ESF, nek konkursprojektoj de Eŭropa Unio, ni ne organizis monpetan kampanjon ĉe esperantistoj, kaj ni ne ricevis helpon nek de Hungara E-Asocio, nek de ILEI... - ni realigis ilin tute memstare.

Ni ĝojas, ke pluraj el niaj eksaj kursanoj iĝis aktivuloj en diversaj movadaj terenoj. Oni povas trovi ilin en estraro de diversaj junularaj organizaĵoj, ĉe TEJO, ĉe Muzaiko, ĉe HEJ, ĉe Kolektaĵo Fajsz, ktp. - kaj pluraj el ili jam iĝis mem instruistoj de Esperanto.

*Szilvási László*  
*gvidanto de Eventoj / Lingvo-Studio*

<http://www.eventoj.hu>